LVP

# PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jara abono 30 GM
kun germana
eldono END 40 GM
================
PSch Konto
Nürnberg 81956-851

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 4/76 - 23 jan 1976
Aperas ĉiusemajne

## Informoj de Eŭropa Esperanto Centro (EEC)

Schoorl (pp) E E C informas:

En la Universitato de Nijmegen, Nederlando, okazos Esperanto-Kurso en lingvolaboratorio de la 12-a de aprilo ĝis la 16-a de aprilo 1976. Ĉiutage estos instruado dum 6 horoj. Sub gvidado de la direktoro de la Lingva Fakultato, d-ro T.J.M. van Els, estos esplorata la lernebleco kaj praktika uzeblo post ĉi tiu mallonga studado. Tial estas necese ke la partoprenontoj havu nenian scion en la Internacia Lingvo.

La Nederlanda Ministro pri Edukado konsentis pri la peto de la lernejoj, kiuj partoprenas en la ILEI-eksperimento en Regiono II, instrui en la kadro de la normalaj instruhoroj. Li permesis por du jaroj, 70 horojn jare.

En rilato al la raporto pri la formiĝo de Eŭropa Unuio la Belga Ministro-Prezidanto, s-ro L. Tindemans, promesis al la Eŭropa Esperanto Centro en Schoorl, Nederlando, esplorigi la eblecojn de la Internacia Lingvo kiel rimedo por stimulado de efektiva integriĝo en Eŭropo.

### Cinq minutes avec «Monsieur Espéranto»

Lors de son récent passage à Bruxelles, le Dr Humphrey R. Tonkin, nouveau président de l'Universala Espéranto-Asocio, s'est entretenu avec des animateurs belges et français.

Pour le responsable de l'U.E.A., l'appel au travail bénévole a donné des résultats qui dépassent toutes les espérances. Dans quelques semaines, des volontaires aideront les permanents du secrétariat mondial, à Rotterdam.

Le Dr Tonkin reconnaît que les possibilités du mouvement espérantiste ne sont pas illimitées. Néanmoins, une activité culturelle qui compte des centaines de milliers de sympathisants et de membres permet, par une coordination plus grande des efforts, d'obtenir des résultats. Citons, par exemple, les congrès qui réuniront à Athènes (1976) et à Reykjavik (1977) des participants de 40 pays, les nouveaux documents sur la langue internationale, l'Espéranto par la radio et la télévision, les utilisation pratiques dans les domaines les plus divers, etc...

Avant d'assister à une réunion de l'Europa komisiono, le président salue cordialement les espérantophones du Nord. Il leur souhaite des contacts fructueux avec les clubs du monde entier. «Dankon, sinjoro prezidanto» (merci, Monsieur le Président).

## Kvin minutoj kun "Monsieur E"

Roubaix (pp) - Post telefona intervujo kun la UEA-prezidanto Humphrey Tonkin en la tri nordfrancaj ĵurnaloj "Nord Eclair", "Nord Matin" kaj "La Voix du Nord", eldonoj Roubaix, aperis la apuda artikolo kun la surskribo "Kvin minutoj kun 'Monsieur Esperanto'", la 15-an de januaro 1976.

Informis L. Giloteaux, Croix, kiu regule sendas interesajn informojn!

## Kaftrinkado en Muzeo

Schwelm (pp) - S-ro Anton Kronshage, Eulenweg 5, D-583 Schwelm, ĵus kontraktis kun la estro de "Niederbergisches Museum" en Wülfrath partopreni la 3-an de julio 1976, je la 15-a horo je speciala kaftrinkado (Bergische Kaffeetafel) kun 40 esperantistoj el Wuppertal/Schwelm kaj ĉirkaŭaĵo; prezo 4,50 GM. Interesuloj bonvolu baldaŭ aliĝi sendante antaŭpagon de 2,-- GM en poŝtmarkoj al la supra adreso!

Aliĝintoj poste ricevos pli detalajn informojn pri la muzeo ktp.

Wülfrath estas relative facile alveturebla de Düsseldorf, Essen kaj aliaj lokoj de la Ruhr-Wupper-Regionoj.

## 61-a Universala Kongreso de Esperanto

Rotterdam (pp) - Aperis Oficiala Komuniko N-ro 3. El ĝi ni citas:

### Hiltona Inaŭguro

La Inaŭguro kaj Malfermo de la 61-a UK okazos en la ĉefa salono de la impona hotelo Hilton, ĝenerale rigardata kiel unu el la plej belaj konstruaĵoj en la monda ĉeno de "hiltonoj". Tute el marmoro, la hotelo frontas al Akropolo trans panoramo de la urbocentro. Tie ankaŭ frandos la bankedantoj kaj dancos (preskaŭ) ĉiuj kongresanoj, ĝuante la vesperan freŝon sur la hotela teraso.

### Regiona kunlaboro kaj trafaj argumentoj

La ĉeftemo de la Kongreso estos: "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo". Sub tiu titolo estos traktitaj la jam ekzistantaj grupiĝoj de ŝtatoj kiel ekzemple tiuj de okcidenta kaj orienta Eŭropo, de Afriko, de Pacifiko, ktp. Krome estas decidita unu "movada" ĉeftemo, nome: "Kiel nuntempe argumenti por Esperanto". Ĝi celas veki diskuton pri la plej bonaj manieroj adapti la informadon pri la Internacia Lingvo al la ŝanĝiĝantaj mondaj cirkonstancoj kaj al modernaj pensmanieroj.

### Sekretario de ISU

La sekretariecon de Internacia Somera Universitato por 1976 transprenis - laŭ decido de la Estraro de UEA - Michel Duc Goninaz, asistento en la Universitato de Provence, Francujo, kaj unu el la tri membroj de la konstanta komisiono pri ISU.

### Plia branĉo por Belartaj Konkursoj

Ekde la nuna jaro estas aldonita plia branĉo al la Belartaj Konkursoj, kiujn rajtas partopreni interalie ĉiuj aliĝintoj de la Universala Kongreso. Temas pri la Premio Luigi Minnaja, por kiu la monon donacis la konata familio Minnaja en Italujo memore al la forpasinta Luigi Minnaja. La premio estos ĉiujare aljuĝita al la plej bona eseo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo kaj ĝia uzado.

### Denove ebleco lerni la Cseh-metodon

Post dekjara interrompo denove okazos en la kadro de la UK seminario pri la instrumetodo de Andreo Cseh, la metodo, kiu havis tiel grandskalan sukceson en la intermilitaj jaroj. La seminario daŭros kvar tagojn po 2 horoj tage, kaj al ĝi necesas aparte aliĝi. La partoprenintoj povos ricevi oficialan ateston de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

### LKK en la greka televido

En Grekujo regas kreskanta interesiĝo pri la 61-a UK. Lastatempe aperis pluraj artikoloj pri Esperanto en grekaj ĵurnaloj kaj komenciĝis kelkaj novaj Esperanto-kursoj. La 3-an de decembro 1975, en la ĉefa taga novaĵelsendo, la greka televido montris kelkminutan raportaĵon pri la tiam okazinta kunsido de la Loka Kongresa Komitato, kiun partoprenis ankaŭ unu el la du konstantaj membroj de LKK el la Centra Oficejo en Rotterdam.

### Aliĝoj

Ĝis la 12-a de januaro 1976 estis registritaj 394 kongresanoj. El la netranspagipovaj landoj alvenis vera amaso da provizoraj aliĝoj (ne enkalkulitaj en la nombro de kongresanoj). Precipe regas grandega interesiĝo en la najbara lando Bulgario.

## Por esperantistaj familioj

Darmstadt (pp/eki) - En ĉi tiu jaro la Turista Asocio "La Naturamikoj", landa asocio Hesio r.a., fakgrupo Esperanto, organizas unu semajnfinan renkontiĝon kaj unu feriosemajnon speciale por esperantistaj familioj. La semajnfino estos la 15-an kaj 16-an de majo 1976; la feria semajno okazos de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1976.

Stilo, programo, maniero de organizado estas unuavice aranĝotaj por junaj familioj kun infanoj. Ni akceptas tamen ankaŭ aliajn esperantistojn, se ili pretas akcepti tiun stilon. Ambaŭ aranĝoj, la semajnfina renkontiĝo en majo kaj la feria semajno en julio, okazos en la TAN-domo "Schriesheimer Haus". La domo situas meze en arbaro, proksime al la urbeto Schriesheim apud Heidelberg. Per aŭto oni povas veturi ĝis la domo, sed nur gastoj de la TAN-domo rajtas uzi tiun straton. Aliĝintoj, kiuj vojaĝas fervoje, informu la organizantojn pri la alvenhoro. Ili tiam zorgos pri la transporto de la stacidomo ĝis la TAN-domo, per aŭto.

La domo havas ĉambrojn kun 3, 4 kaj 5 litoj. Ni kuiros mem komune, tial ni ne povas precize antaŭdiri la prezon por la restado; ĝi dependos de la efektivaj elspezoj. Oni povas kalkuli proksimume 10 GM po tago por plenkreskulo, la duonon por la infano.

La nombro de partoprenantoj estas limigita, tial baldaŭa aliĝo necesas. Pliajn informojn donas: Eki Woite, Kirchstr. 33, D-6115 Münster bei Dieburg, telefono (06071) 33568. Al tiu adreso oni ankaŭ direktu la aliĝon!

## Someraj Universitataj Kursoj

Lieĝo (pp) - La estraro de asocio "Someraj Universitataj Kursoj" (SUK) decidis pri la detala programo de la 3-a SUK-sesio, kiu okazos en Antverpeno. Ĉiu unusemajna kurso ampleksos minimume 8 lekciojn de po 45 minutoj, faritajn ĉefe matene de lundo ĝis vendredo.

1-a semajno de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1976 Biologio kun lekcioj de d-ro Carl Step-Bowitz, profesoro pri zoologio, Universitato Oslo, Norvegujo.

2-a semajno de la 15-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1976 Biologio kun lekcioj de d-ro Wim M.A. De Smet, esplorgvidanto en la Ŝtata Universitata Centro de Antwerpen kaj docento pri didaktiko de biologio en la Universitata Institucio de Antwerpen, Belgio, kaj de d-ro Bèla Meszáros, docento pri zoologio, Universitato de Debrecen, Hungario.

3-a semajno de la 22-a ĝis la 29-a de aŭgusto 1976 Biologio kun lekcioj de d-ro De Smet kaj d-ro Meszáros.

### Matematiko

1-a semajno kun lekcioj de d-ro William F.Orr, asistanta profesoro pri matematiko, Hofstra Universitato, Hempstead, Usono, kaj d-ro Olav Reiersel, profesoro pri matematika statistiko, Universitato de Oslo, Norvegio

2-a kaj 3-a semajnoj same kun lekscioj de d-ro Orr kaj d-ro Reiersel.

### Sociologio

1-a, 2-a kaj 3-a semajnoj kun lekcioj de d-ro Peter G. Forster, lekciisto en fako de sociologio kaj socia antropologio, Universitato de Hull, Grandbritio, kaj d-ro Marian Dobrzynski, adjunkto en Ĉeflernejo de Planado kaj Statistiko kaj Instituto de Organizado de Maŝinindustrio, Varsovio, Pollando.

SUK (daŭrigo)

La kromprogramo enhavas i.a. ekskursojn, vizitojn al la urbo, filmvesperojn, kulturajn aranĝojn, sportadon, perfektigan Esperanto-kurson.

Dum la sesio la studantoj disponos pri modesta biblioteko de fakaj libroj en diversaj lingvoj. Ĉiu SUK-studento rajtas prezenti sin al ekzameno, kiu estos nur skriba.

Pliajn informojn pri la SUK-sesio donas la Estraro, laŭ la adreso:

Someraj Universitataj Kursoj, B.P. 9, B-4000 Liege 3, Belgio.

Esperanto en Radio

Varsovio: "Vera lavango de poŝtkartoj kaj leteroj venis al nia redakcio en la lastaj tagoj de la pasinta kaj la unuaj de la nova jaro", tio estis la enkondukaj vortoj de la pasintsemajna leterkesto, en kiu ni eksciis, ke dum la jaro 1975 la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ricevis 5 304 korespondaĵojn.

"Tiu ĉi nombro estas definitiva kaj kosma, unuafoje en la historio de nia redakcio....ni atingis tian grandan venkon", estis la komento.

Jen ni publikigas liston de 20 landoj, el kiuj venis la korespondaĵoj, poŝtkartoj kaj leteroj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Finnlando | 1092 | Italio | 154 |
| Sovet-Unio | 1000 | Svedio | 114 |
| Ĉeĥoslovakio | 473 | Belgujo | 93 |
| Germana Demokratia Respubliko | 447 | Aŭstrio | 84 |
| Federacia Respubliko Germanio | 413 | Hispanujo | 72 |
| Hungario | 316 | Bulgario | 67 |
| Francio | 203 | Danlando | 61 |
| Britio | 201 | Jugoslavio | 58 |
| Nederlando | 191 | Norvegujo | 40 |
| | | Svislando | 37 |
| | | Usono | 32 |

En la semajno de la 8- a ĝis la 12-a de januaro eniris 122 korespondaĵoj. Surprize ĉi-foje la unuajn du lokojn tenas aŭskultantoj el okcidentaj landoj: A. Chalm, Le Havre, Francio, kun 10 kaj L. Pickel, Nürnberg, FRG, kun 8 leteroj.

Radio Roma: D-ro A. De Salvo denove atentigis pri la nove enkondukita programo de Vatikana Radio. Kiom ofte kaj je kiu tempo tiu elsendo okazas ne jam estas konata. Necesas nun serioza reago de esperantistoj skribante al Radio Vatikana, Vatikan-Urbo.

Pekino en sia vendreda elsendo prezentis la funebran ceremonion por la mortinta ĉefministro Ĉu-En-lai.

Vieno ricevis dum la pasinta semajno 18 alskriboj, inter ili Einzi Stolz, la vidvino de la komponisto Robert Stolz, kaj prof. d-ro Ivo Lapenna kaj partoprenintoj de la pedagogia seminario en Neustadt El FRG venis la plej multaj alskriboj, nome 6.
Post la semajna komentario de d-ro Alfred Macher, kiu ĉi-foje traktis financajn problemojn aktualajn, Ingrid Plazotta kaj d-ro Karl Beckmann prezentis la unuan artikolon el la serio "Grekoj en Aŭstrio".

Svisa Kurtonda Servo: D-ro A. Baur parolis interese pri la evoluo de turismo nuntempa en Svislando; Ges-roj Gacond daŭrigis sian serion pri Literatura Mondo, ĉi-foje citante Julio Baghy kaj lian impreson pri la "Esperanto-propagandisto".